AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado

Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno XV, Fünfhausgasse 16, Austrio. — Telefono R 33-3-64

7-a javo OKTOBRO 1952 u-vo 10

L I B E R E C O K A J D I G N O D E L A H O M O .

Sub tiu devizo okazis de la 11a-14a de septembro en Vieno la AŬSTRIA KATOLIKA KONGRESO (Österr.Katholikentag). Libereco kaj digno de la homo estu nepre respektataj,konsideratataj kaj laŭsence en ĝenerala vivado tutmonde aplikataj, jen finfine la postulo esprimita dum menciita kongreso !

Estis de komenco klare, ke ankaŭ la katolikaj E - istoj en ties kadro faru specialajn aranĝojn. Malgraŭ multaj malfaciloj pro adapto al la ĝenerala programo solvo estis trovata. Delegacio de la katolikaj E-istoj laŭ oficiala invito jam partoprenis ĉe la akcepto de la Papa Legato,merkrede,la 10.9. Estis distingita per tiu alta ofico ja neniu alia sed nia Viena ĉefepiskopo kardinalo d-ro Theodor I n n i t z e r, al ni bone konata kiel sincera amiko kaj favoranto de E. ("... estas ja kultura afero...", kiel li mem esprimis sin, sendante saluton al la lastjara Viena E-Tago).

La katolikaj E-istoj marŝis kun sia granda, bela, multe admirata flago (verda tuko, en kies supra ĉestanga blanka kvadrato troviĝas la verda stelo kun blanka kruco enmeze), depost marto 1938a deponita kaj gardita en la ĉefepiskopa dioceza muzeo de Vieno;nun ĝin impone portis juna s-ano Reiter el Salzburg.

"Interkonatiĝa renkonto" okazis vendrede,la 12.9. posttagmeze en Internacia E-Muzeo, kie Hofrat Steiner

kore akceptis kaj gvidis la ges-anojn, ankaŭ el diver = saj liglandoj kaj s-anon N o l l el Nederlando venin = tajn . Tre edifa vere fariĝis la D i ŝ e r v o sabate , la 13.9. je 10a en la antikve inda ordena preĝejo je Sta. Elizabeto el la 14a jarcento . Celebris la s.meson. kaj predikis en E. riĉenhave komandora moŝto pastro Ge = org P l a n k , malnova E-fidelulo pionira , pri " La paŝtista ofico de Jesuo en la mondhistorio" . La mult= nombra samcelanaro en E. liturgie preĝis - s-ano Gas = perini faris digne la lektoron - kaj kantis parton de Schubert-meso, uzante la de s-ano Hans Steiner , Wörgl, afablege donacitajn tekstojn. Orgenludis s-ano Fellinger dankinde.

La F e s t k u n v e n o , samtempe memoro pri 40 jaroj katolika E-movado en Aŭstrujo bone evoluis en la sufiĉe granda kaj plena Thomas-Saal, Vieno I., Postg.4 a sub prezido de AKLE-prezidanto Ministerialrat d-ro M.Füh= ring, kiu ankaŭ transdonis la salutojn de fed. ministro por instruado, d-ro K o l b. Ĉefepiskopo kardinalo d-ro I n n i t z e r estis sendinta skribe " bendeziron kaj bensaluton" al ĉiuj partoprenintoj, kiuj entuziasme es = primis dankon kaj plenan sindonemon al la Sankta Patro kaj ties legato, la Viena ĉefpastro, ilin beninta. Kro = maj leteroj de saluto resp. senkulpigo estis de eksmini= stro de instruado, d-ro Hurdes, ĝeneraldirektoro de poŝto, d-ro Dworschak, kaj speciale de IKUE-prezidanto prof. vi= kario Beckers, Belgujo, de KEZ, München, de dekano Berg = weiler (Pfalz) k.a. Persone salutis nome de la movado en la ĉefdiocezo Salzburg katedrala vikario J. K a p s, por Stirio d-ro A. H a l b e d l , por Karintio prof. d- ro P. H o h e n w a r t e r. Krome por AEF afergv. prezid = anto C e c h , por IEMuzeo Hofrat S t e i n e r , por UEA ĉefdelegito mag. H ö f e r t .

Sekvis poemeto (de W. Mudrak), elokvente deklamita de f-ino R. Jünger "Al nia flago!" Brilis sur la estrado tiu flago, jam menciita, benita dum Katolika Kongreso 1933 de tiama IKUE-prezidanto Font Giralt, mortinta kelkajn jarojn poste kiel martiro en sia patrujo Hispanujo.

La nuna raportanto kiel AKLE-afergvidanto povis do= ni koncizan h i s t o r i a n r a p o r t o n pri la

katolika E-movado en Aústrujo ekde ĝia estiĝo la 11an de septembro 1912. Bedaŭrinde ja nur skiza prezentado povis isti donata, multo devis resti nemenciita , kvankam ne = forgesita, pri tiuj de la du mondmilitoj kaj la tempo de malpermeso dum la ns.-reĝimo interrompitaj jaroj de agado. Granda ankaŭ estas la nombro de la meritplenaj geliganoj jam mortintaj. Ĉiuj estu rememoratai, kvankam nur kelkaj aparte citataj: Pastro F. Mestan, pastro W. Nedwid, red. Schröder, Hofrat Jungwirth, s-ano Ulm , dir. Schamanek, s-ano L. Chiba kaj edzino , Hofrat Walka, s-ino Kubin , s-ano R. M. Frey, dir. Schiebl , s-ano Zimmermann . Kiel m a r t i r o j estis mortintaj d-ro M.J. Metzger, pas= tro vere por la paco de Kristo, kaj s-ano Gustav Weber pro Esperanto en aprilo 1945, Mauthausen-Gusen . Honoron kaj preĝmemoron al ili !

INFORMOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

El la protokolo de la septembra estrarkunsido: Oka= ze de ĵorvojaĝo la afergvidanto povis interparoli pri organizaj aferoj kun la s-anoj en Vöcklabruck,Wels kaj Linz.- La semajna gazeto "DIE FRAU" (Vieno) denove ape = rigas E-kurson; tion ni dankas al la iniciato de d-ro Grimme. Estus necese, skribi multajn dankleterojn al la redakcio. - Post negativa respondo de la magistrato de Vieno pri subvencio al AEF delegacio vizitos urbestron Jonas, por al li persone submeti la peton pri subvencio. - D-ro Grimme akcentis, ke la araĝoj de AKLE-Vieno ĉiam estas bone organizitaj kaj viziitaj. - La kasosaldo ta= ge de la kunsido estas S 391.85. Specialan mencion meri= tas monkolekto de anonimaj ges-anoj por administraj ce = loj, kiu alportis S 1.000.--. -La UEA-Kongreso 1953 ok = azos en Zagreb de 27.7.-3.8. Pro tio la Centro rekomen = dis al LKK en Klagenfurt, araĝi la venontan Aústrian E= Kongreson laŭeble inter la 24a.ĝis 26a de julio, por ke eksterlandaj ges-anoj havu oportunan eblecon,viziti ankaŭ nian kongreson.-

Esperanto ĉe Radio-Vieno. Krom la konstantaj ĉiu = merkredaj informaj disaŭdigoj (Radio-Vieno I) je 22.35 - 22.40 h la ĝenerala direkcio de Ravag ree konsentis daŭr=

igi la mardajn sendojn kaj disponigis al la radiokomitato de AEF ekde la 7a de oktobro por la nova periodo eĉ 20 minutojn, Tiuj mardaj dissendoj okazas ĉiun duan mardon je 16-16.20 h. per Radio Vieno II. La ges-anoj el la ligландoj estas petataj pri alsendo de taŭga materialo por disaŭdigo.

A Ŭ S T R I A E S P E R A N T O - K R O N I K O

VIENO: "Danubio" ekde novembro kunvenos ĉiun 1an kaj 3an dimanĉon je la 10a en gastejo Bauer,7., Sigmunds - gasse 14. "Harmonio" gastigis italan s-anon d- ron Rozzo el Milano,kiu faris interesan paroladon en la grupo. En "Laboro-Kalocsay" la svedo Goves en kunesto de sia ĉarma edzino antaŭ 50o da Vienaj ges-anoj parolis kun projekciado de 120 eksterordinare bonaj kolordiapozitivoj pri sia moderna kaj antikva hejmurbo Stokholmo. "Suno" kunvenas ĉiun 1an kaj 3an lundon en la hejmo de grupestro Karl Patak, 21., O'Brieng. 30/7. "Centro" kunvenas - sub estro Stefan Zodel en 1., Neutorg. 9, ĉiun 2an kaj 4an ĵaŭdon. "AKLE" kunvenas en Graben 13/25 ĉiun 2an kaj 4an mardon de 17-19.15 h. 12.XI.: "Eminentaj mortintaj ges - anoj". Elementa kurso: 19.30 - 20.30 samloke ekde 14.10.

S-ano Frank HALLS el Melbourne-Aŭstralio estis de 14 - a ĝis 17-a de Okt. en Vieno kaj faris en la ejo de la Natur-Amika fakgrupo kaj en la grupo "Laboro-Kaloscay" lumbildparoladojn, prezentante 5 kolorajn mallargfilmojn .

Komitato por propagando de la "Popolkongreso por la paco" aranĝas merkrede 1a 29-an de Okt.en la viena E-Centro,XV. Fünfhausg.16, Esp-istan kunvenon. Partoprenontoj pro informoj skribu al s-anino Steffi Krautschneider, Wien VI, Aegydigasse 12/11.

25 jar-jubileo de la Internacia E-Muzeo en Vieno

Dimanĉe, la 17.8.52 festis IEMuzeo-Vieno sian 25 jaran ekziston.Ĉeestis proksimume 70 Vienaj ges-anoj kaj gastoj. S-ano Hofrat Steiner, la fondinto-direktoro, salutis la geesperantistojn kaj skizis en mallonga parolado

la estiĝon kaj evoluon de la muzeo, la unika kaj por la tutmonda E-movado tiel grava institucio.Nome de la AEF-estraro s-ano majoro Sinner alparolis la ĉeestantojn kaj esprimis al la estraro de IEM la gratulojn de la aústria E-istaro. - Sekvis la malfermo de la "Konstanta E-Ekspozicio", lokita en la plej granda salono de la muzeo. En 26 tablaj vitrinoj la ekspozicio prezentas al la vizitantoj la evoluon kaj nunan staton de la E-movado , precipe de la E-literaturo. Dum la rondirado en la ekspoziciejo, kiu montras pli ol 700 E-librojn el ĉiuj medioj , de la movado, s-ano Hofrat Steiner klarigis la montratan librotrezoron. La vere interesa ekspozicio estas viziteblа ĉiun lundon, merkredon kaj vendredon vizitebla inter la 10a ĝis 16a h. Adreso: Vieno I.,Michaelerplatz Hofburg, Batthyanistiege, IVa etaĝo. R.C.

Viena urbestro Franz Jonas en la Esperanto-Centro

Okaze de la solena inaúguro de la urba loĝdomo en 15 ., Fünfhausgasse 16, kiun partoprenis de la urba administracio krom la urbestro ankaú vicurbestro Honay, Stadträte Thaller kaj Koci kaj urbdistriktestro Hajek , la nomitaj aútoritatoj, gvidate de la urbestro,vizitis nian E-Centron. Nia s-ano Obermagistratsrat d-ro Grimme kiel gvida funkciulo de AEF uzis tiun ĝojigan okazon por alparoli s-anon urbestron en nia lingvo kaj danki al li kaj la kompetentaj urbaj instancoj pri la por ni tiel gravega helpo,farita per disponigo de la belaj kaj taú - gaj ejoj en la nova loĝdomo. S-ano urbestro afable konversaciis kun la aro da ĉeestantaj geesperantistoj en nia lingvo kaj mem videble estis kontenta pri nia bela nova hejmo, kiu respekte al la inaúguro estis ornamita per multaj flagoj. Kiam s-ano Pachmann je la adiaúo de s-ano Jonas ekkriis: "Vivu la unua Esperantista urbestro de Vieno!" kora aplaúdo, multaj "ĝis revido"-j kaj ĝojplenaj vizaĝoj dankis la urbestron pri lia veno.

Stadtrat Thaller dum sia alparolo al la publiko, menciante la instalaĵojn de la domo, nomis ankaú la E-Centron. Li akcentis, ke la E-istoj meritas generalan atenton, ĉar iliaj aspiroj celas la interkomprenon de la popoloj. H.K.

MALSUPRA AÚSTRIO : 3a Malsupra-Aústria E-Tago en Hohenberg, 5.10.52. Malfavoris la venon al la ĉarma ĉijara kunvenejo de la malsupra-aústriaj geamikoj malbona vetero kaj komplika alvojaĝeblo. Tamen jam

sabate alvenis 30o da partoprenintoj , kiuj estis kore bonvenigataj de s-ano Franz L a m p l , E-grupestro de Hohenberg. Grupo da naturamikoj , gvidate de s.anoj Finkenzeller kaj Braun aliris la Gscheid-monton, aliaj konsentis ekskursi en la aútunkoloran , ravan ĉirkaúon de la loko . Vespere la jam.ĉeestantoj kuniĝis en gastejo Glöckl por amika kunestado . Dimanĉe aliĝis plua dudeko da personoj el St.Pölten, Vieno kaj ĉirkaúo de Hohenberg kaj la reprezentinto de Stirio.Posttagmeze:laborkunsido. Salutis s-ano Lampl kaj la AEF-landestro, s-ano Schwarz, referatis pri la E-aferoj en la liglando, akcentante la gravecon de pliintensigo de la E-laboro kaj de la pliintimigo de la kontakto inter la grupoj kaj la landestraro. Malgraú la aktualaj malfaciloj, kiujn renkontas nia agado, ni devas progresigi la movadon! S-ano afergvidanto de AEF parolis pri la agadó de la Centro kaj la stato de la aústria movado.Kontribuis la diskuton s-anoj Sinner , Finkenzeller kaj Postl, Balague, Schmid, Braun kaj ĉiuj per siaj vortoj montris sian neŝanceleblan intereson pri la prosperigo de nia afero.Pluraj poemoj deklamitaj aludis la idealan flankon de nia agado. Substrekante, ke la sukcesinta aranĝo de la E-Tago ebligis la akordigon de la komunaj aspiroj, s-ano AEF-landestro Schwarz fermis la nunjaran E-Tagon de Malsupra Aústrio. R.C.

LA 38a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN OSLO

de UEA-ĉefdelegito mag. Franz Höfert, Vieno.

Partoprenis pli ol 1600 personoj el 35 landoj. Krom la amasaj aranĝoj (inaúguro, balo ktp.) la kongreso okazis en la Universitato.Mi vizitis nian aústrian ĝeneralkonsulon, kiu akceptis min tre afable kaj garantiis almi ĉian helpon . Ne necesis! Mi transdonis en la urbestrejo la leteron de la Viena urbestro Jonas al la Osloa urbestro. Mi transdonis dum la kongreso pli ol 100 varbilojn de nia kuracloko Aflenz. Tre ofte mi aúdis laúdojn pri nia bela hejmlando kaj la (por eksterlandanoj) malmulte kosta restado ĉe ni.

Pri la aranĝoj mi nur povas ekstrakte kaj glitlume raporti. Okazis katolika kaj protestanta Di-servoj. La protestantan celebris blinda diakono kaj pastro. Tre tu-

ŝis min, ke la katolika pastro partoprenis la protestan= tan Diservon. Okaze de la oficiala salutado, senŝargîg= inte.min de miaj tiurilataj devoj,mi aldonis du personajn petojn. Mi diris:"Mi petas vin, karaj norvegaj ges-anoj, kunhelpu , forigi la malamon , kiun oni bedaúre ankoraú trovas inter la norvegaj neesperantistoj. Kiu volas estonte tutmondan pacon,tiu devas forgesi la estintecon! Due mi petas vin, pacamantojn el kvin kontinentoj, dis= vastigu peton, voĉon, postulon el Aústrio , lando , kiu 1938 estis okupata unue kaj kiu ankoraù nun estas okupi= ata, kvankam la mondo promesis al ĝi la liberacon deantaú 10 jaroj jam ofte.Do aúskultu kaj dissciigu la aústriajn sopiregon,petegon,kriegon, la aústrian postulegon:mondo, donu al Aústrio la promesitajn liberecon kaj memstarecon!" Tiuj vortoj sekvigis aplaúdegon,kian rikoltis neniu lan= da reprezentinto. Multaj personoj gratulis.

Okazis la Internacia Somera Universitato,inter kies temoj alte rangis la paroladó de s-ano prof.d-ro Sirk pri la Brown-a movado.Okaze de la malfermo de la Ĝenera= la Kunveno,kiun partoprenis proksimume 500 personoj,est= is legataj la salutoj ankaú de la urbestro de Vieno kaj de Wörgl.D-ro Sirk transdonis la salutojn de la Altlern= ejo de Vieno. La diskutado tuŝis la problemon UEA -SAT. I j rekomendis la kunfandiĝon,aliaj diskutanoj pledis por samurbaj kongresoj,kelkaj elparolis la deziron pri aliĝo de SAT kiel faka asocio al UEA.Stöp-Bowitz, parolante por ISAE, menciis, ke tiu organizo havas bonajn rilatojn kun UNESKO. Prof. Lapenna raportis,ke CED dissendadas doku = mentojn en tri lingvoj al pli ol 100 institucioj kaj ga= zetservoj. La kunsido de la 1a Sekcio pritraktis la edu= kan valoron de la E-kunveno. Plej necesas bona reĝisoro, li zorgu,ke la kunveno altiru ankaú la junularon.Kunve = no de la 2a Sekcio traktis funde sciencajn temojn kaj la 3a Sekcio atentigis speciale pri la neceso de rilatado kun internaciaj neesperantistaj kongresoj. Menciindas la Distra Vespero. Variaj muzikprezentaĵoj, eĉ per strangaj instrumentoj, majstraj imitoj kaj skeĉoj; infanaj gimna= stik-akrobataĵoj; interesa divenkonkurso el la mondlite= raturo; ventroparolulo ktp.

Denove la 1a Sekcio: Plimulto preferas kombinon de la rekta kun la lernlibra instrumetodo.Kvara Sekcio: oni

eksciis, ke la jam ekzistanta E-ista Komerca Ĉambro kunigas sole en Francio jam pli ol 100 firmaojn. ISAE: diskutado pri terminologiaj vortaroj ktp. Arta Vespero kun alta programo: Urba Orkestro, kantoj,fortepianaĵoj. Ekskursoj.Kronprinco Olaf akceptis aŭdience la UEA-prezidanton kaj la prezidanton de LKK. Belartaj konkursoj: 43 personoj el 18 landoj sendis 109 konkursaĵojn. Unuan fojon okazis infankunveno. 17 infanoj el 6 landoj konversociis, kantis, ĉokoladmanĝis, aŭskultis fabelon, rakontitan de d-ro Sirk. Okazis parolado kun lumbildoj pri Norvegio. Horeto de poezio. Blinda orgenisto kaj komponisto prelegis pri norvega muziko. Kongresa Balo: La urbestraro regalis en la pompa Urba Domo 1300 ges-anojn per buterpanoj, kun diversaj delikataĵoj, trink-kaj fumaĵoj;dancado en la grandega salonego, ĉarmaj naciaj kostumoj.

Fine la solena Fermo. Resumoj pri la kongreso, premioj, sciigo pri la elekto de s-ro Jung kiel honora membro de UEA. Danko al LKK. Rezolucio, kiu rekomendas al la instancoj naciaj kaj internaciaj objektivan studadon de la problemo pri la Internacia Lingvo.kun aludo pri la konvinkaj rezultoj de la Esperantista praktiko.

(Rimarkigo de la red.:s-ano Höfert petis nin,sciigi, ke li volonte disponigas sin por paroladoj pri la kongreso en la E-grupoj.)

La POŜTISTA FAKGRUPO sciigas: kurso elementa komenciĝas ĵaŭde, 23.10. (18-20 h). Kurso por progresintoj: dimanĉe, 26.10., 9-11 h. Ambaŭ en I., Postg. 8, IV/345 , telef. R 24500/313.

"LA SOCIALISTO", lastaj n-roj ekde oktobro 1933 estas sercataj. Kiu povas disponigi,tiu bv.deponi ilin en Centro pro s-ano Ludwig Kraus.

Eigentümer und Herausgeber: Österr.Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur : Hugo Kraus, sämtliche W i e n XV., Fünfhausgasse Nummer 16
Druck: Offset Vervielfältigung, ADRESSEN-SUPPAN Wien IV., Brucknerstrasse 2, U 41-2-70